

SES 2013-bulteno

2013-06-10



Informoj por aliĝintoj al la Somera Esperanto-Studado 2013, Martin, Slovakio:

Elkoran dankon pro via aliĝo! Ni rekomendas al vi trovi iom da tempo por tralegi ĉi-subajn informojn por esti bone preparita por senproblema alveno kaj ĉeesto en SES 2013.

Rimarko: bonvolu plusendi tiun ĉi mesaĝon al aliaj koncernuloj, se ili aliĝis per via retpoŝt-adreso, eventuale sciigu ilin pri la enhavo de ĝi.

Gravaj informoj

Dum la tuta aranĝo necesas sekvi instrukciojn de la organizantoj.

Ĉiu partoprenanto partoprenas la aranĝon je siaj propraj respondeco kaj danĝero, kion li/ŝi konfirmas per sia subskribo ĉe registriĝo. Li/ŝi portas personan respondecon pri la damaĝoj de sano kaj havaĵo kaŭzita al si mem aŭ al alia persono.

La organizanto (E@I) ne transprenas respondecon pri damaĝoj je sano kaj havaĵo de partoprenantoj, kiuj rilatas ĉeeston de la aranĝo SES 2013, aŭ vojaĝon kaj restadon en la loko de ĝia okazigo.

1. Pagoj:

Bonvolu memori, ke via aliĝo estos valida nur post ricevo de la antaŭpago por la aranĝo (pago de aliĝkotizo). Sen tio, ni ne povas garantii rezervitajn tranoktojn, manĝojn kaj aldonajn servojn (vi povas pagi antaŭe ankaŭ la tutan sumon necesan). Se vi ankoraŭ ne pagis la aliĝkotizon, faru tion laŭeble baldaŭ.

2. Mono:

En Slovakio validas la valuto „eŭro“, mallonge EUR. Por la aranĝo eblas pagi surloke nur per eŭroj (ni ne akceptas aliajn valutojn, monŝanĝejo ekzistas en la urbocentro, ĉ. 1 km for). Dum la aranĝo eblas aĉetadi, ekzemple en trinkejo aŭ libroservo, same kontraŭ eŭroj.

3. Alveno/foriro:

La aranĝo komenciĝas la 12-an de julio posttagmeze (alveno eblas ekde la 14-a horo) kaj finiĝas la 20-an de julio posttagmeze, je la 13-a horo. Kaze de bezono eblas veni 1 nokton pli frue, kaj eventuale resti kelkajn noktojn post la aranĝo, kontraŭ kroma pago. Se vi bezonas kromajn tranoktojn, nepre informu nin antaŭ la 1-a de julio, por povi rezervi lokojn.

Adreso de la SES-ejo:

SES 2013 okazos en la universitata studenthejmo de la farmacia fakultato kaj en la apuda mezlernejo Stredná priemyselná škola, kies plena adreso estas:

Vysokoškolský internát JLF UK

Novomeského ul. č. 7

Martin, Slovakio

Loĝado, manĝado kaj nokta programo okazos en la studenthejmo; instruado, posttagmeza kaj vespera programo okazos en la mezlernejo. (ses.ikso.net/loko – vidu ankaŭ tradukojn de la alineo)

Kiel atingi SES-ejon:

Martin estas bela kaj historia urbo, situanta ĉ. 210 km de la ĉefurbo Bratislavo kaj 25 km de Žilina.

La urbo Martin havas tre bonan bus- kaj trajnkonekton kun Bratislava. Ekzistas rektaj konektoj (kaj trajnoj, kaj busoj), ankaŭ konektoj kun unu ŝanĝo. La lasta vespera trajno forveturas el Bratislava al Martin je 17:53 (kun ŝanĝo en la stacio Vrútky). La vojo daŭras ĉirkaŭ kvar horojn. Por serĉi taŭgan konekton vidu www.cp.sk. (dekstre sube eblas ŝanĝi la lingvon al la angla aŭ la germana).

De la flughaveno en Bratislava. Veturu per la buso n-ro 61, kiu alportos vin rekte de la flughaveno ("Letisko") al la ĉefa trajn-stacidomo ("Hlavná stanica"). La stacidomo estas la lasta haltejo, la veturo daŭras 25 minutojn, bileto kostas 0,90 EUR (ĝi validas 60 minutojn, semajnfine 90min. Kaj eblas libere ŝanĝi ene de tiu tempo la veturilojn) kaj aĉeteblas en la flavaj aŭtomatoj en la bushaltejo aŭ en la gazet-giĉetoj. De tie per trolejbuso nr. 210 aŭ per la buso nr. 21 vi povas atingi busan stacidomon ("Autobusová stanica Mlynské Nivy"). La vojaĝo daŭras 8 minutojn (3 haltejoj). Vi povas kontroli ĉiujn itinerojn kaj plani vian vojaĝon en Bratislava ĉe <http://ba.imhd.zoznam.sk>.

De la flughaveno en Vieno (Wien). Ekzistas bona rekta busa konekto inter Viena flughaveno ("Flughafen Schwechat") kaj ĉefa busa stacidomo en Bratislavo (haltejo "Autobusová stanica"). Vi povas kontroli itineron kaj aĉeti busajn biletojn anticipe ĉe http://www.slovaklines.sk/index_en.html. La biletoj ankaŭ aĉeteblas rekte en la buso, kaze ke estas liberaj lokoj.

De Bratislava al Martin. El Bratislavo prenu trajnon aŭ buson rekte al Martin. Foje okazas, ke oni devas ŝanĝi trajnon/buson unufoje, sed iras ankaŭ rektaj. Pli detale itinerojn por via alventempo vi povas kontroli ĉe www.cp.sk.

De Martin (busa kaj fervoja stacidomoj) al la studenthejmo.

Busoj, kiuj iras al SES-ejo el trajna kaj busa stacidomoj, estas jenaj:

- nr. 55 (en la direkto Vrútky) – dufoje tage (posttagmeze) iras urba trafiko rekte al la studenthejmo. La cel-stacio nomiĝas "ŠD LFUK"
- nr. 7, 10, 12, 15, 21, 22, 23, 24, 27, 30, 33, 34, 40, 50, 51, 52, 56, 62 – ĉiuj haltas ĉe la stacio "Dojčenský ústav", kiu troviĝas iom for de la studenthejmo

Elira stacio nomiĝas:

- "SAD" (se vi alveturis per trajno, aŭ via buso haltis ĉe la ĉefa busstacidomo)
- "Ul. Jesenského" (se via buso haltis en la strato Jesenského)

Stacioj apud SES-ejo nomiĝas:

- "ŠD LFUK" (ideale, plej proksime)
- "Dojčenský ústav" (malpli taŭge)



Kiel atingi SES-ejon de la plej proksimaj bushaltejoj.

Vi povas kontroli itineron pli precize ĉe <http://www.mhdmartin.sk/cp/mhd/> (paĝaro de publika transporto en Martin).

Taksioj en Martin

La busa kaj trajna ĉefstacidomoj troviĝas unu apud la alia (vidu la [mapon](#)). Kelkaj busoj haltas ĉe la stacio "Martin, Ul.J.Jesenského MHD" (de kie veturas ankaŭ urba trafiko) en la strato Jesenského. La vojo de ambaŭ lokoj al SES-ejo estas 2,1 km longa. Se vi elektas taksion, jen kelkaj firmaoj.

<http://www.taximartin.sk/> - 0,50 € startkotizo + 1 €/km

<http://www.mbtaxi.eu/> - 1 €/km

<http://www.msautodoprava.sk/stranka/ms-taxi-martin> - 0,33 € startkotizo + 1 €/km

4. SES-ejo:

En la SES-ejo estos je dispono bufedo, drinkejo kaj libroservo.

En la SES-ejo ne estos aparta komputila ĉambro (sed kelkaj komputiloj en la koridoro por uzi), sed senpaga sendrata reto estos atingebla. Ĝin eblos uzi per propraj porteblaj komputiloj. (Bv. do kunporti tiun vian, se vi bezonos retumi pli multe dum la aranĝo.)

En la konstruaĵoj de SES estas malpermesita fumado – bv. respekti tion kaj laŭbezone fumi nur ekster la areo.

En la SES-ejo je dispono estos sporta ekipo (pilkoj, badmintonaj rakedoj, ktp.). En teritorio de la SES-ejo ekzistas du tablotenisaj tabloj, du tenisaj ludejoj, kiujn eblos uzi kaj aldone piedpilka ludejo.

5. Manĝoj:

Manĝado okazos en la manĝejo de la studenthejmo (laŭ tempoj indikitaj en la program-tabelo).

Ĉiuj, kiuj ne mendis manĝojn, devos mem prizorgi manĝojn. En la SES-ejo funkcios ekde 13.00 trinkejo, kie eblos aĉeti simplajn manĝojn kaj trinkaĵojn. Apud la SES-ejo funkcias kelkaj restoracioj aŭ picejoj. En la SES-ejo ekzistas en ĉiu etaĝo kuirejetoj kun gasa kuirplato (tamen sen kuirekipaĵo) por memzorgantoj.

Se vi volas mendi manĝojn, sed ne faris tion en via aliĝilo, bonvolu skribi al ses@ikso.net.

Kafopaŭzo:

Dum la antaŭtagmeza instruado okazos en la koridoro de lernejo kafopaŭzo kun senpagaj teo, kafo kaj akvo. Bonvolu kunporti **propran** tason por tiu celo. Por ŝpari la vivmedion ni volas eviti uzadon de plastaj glaso kaj taso. Se vi ne kunportos propran tason, vi povos aĉeti kontraŭ 2 eŭroj surloke ceramikan tason, ornamo ĝin laŭ via plaĉo kaj uzadi ĝin dum la semajno.

6. Aĉetoj

La SES-ejo troviĝas tre proksime de la urbocentro Martin. En la urbocentro troviĝas apotekoj, trinkejoj, kafejoj, restoracioj kaj la granda komercdomo Prior.

Rimarko: vi povas rigardi nian [Google-mapon de la urbo](#) kun markigo de ĉiuj gravaj lokoj.

7. Ĉambroj, tendoj, prelegejoj:

Je dispono estas dultaj ĉambroj en la studenthejmo. Entute estas ĉambroj por pli ol 700 personoj. Kvar ĉambroj havas komunan necesejon kaj duŝejon. Vi ricevos litotukojn, sed bonvolu kunporti propran bantukon.

La studenthejmo proponas "normalajn" (ordinarajn) kondiĉojn por tranoktoj, do ne atendu grandan lukson. Se vi tamen volas loĝi pli lukse, kontaktu nin pri viaj deziroj aŭ rekte iun el la apudaj pensionoj, hoteloj: [Pensiono Martinn](#), [Pensiono "Čierna pani"](#), [Hotelo Turiec](#), [Hotelo Victoria](#)

Kaze ke vi mendis ĉambron kiel studento, bv. kunporti vian ISIC-karton aŭ alia nstudentan identigilon.

Tendumantoj devas kunporti propran tendon, dormosakon kaj matracon. Oni povos starigi tendojn en la korto de la SES-ejo. Tendumantoj havos eblecon uzi necesejon kaj duŝejon en la SES-ejo.

En la SES-ejo estas lavmaŝinoj uzablaj kontraŭ pago. Lavpulvoro aĉeteblos en la organiza ĉambro.

8. Utilaj ligiloj rilate al vojaĝado kaj tranoktado en Slovakio:

Vojaĝ-horaroj

<http://cp.atlas.sk/> - trajnoj, busoj, aviadiloj, urba trafiko, kombinaĵoj trajnoj + busoj [sk, en, de]

<http://www.imhd.zoznam.sk> – urba trafiko por diversaj slovakiaj urboj [sk, en]

Mapoj

<http://maps.google.com/> [diversaj lingvoj]

<http://www.supernavigator.sk/navigator/> [sk, cs, en, de, hu]

<http://mapy.hiking.sk/> - turistaj mapoj de Slovakio [sk]

Loĝado

<http://www.ubytovanienaslovensku.eu/> [diversaj lingvoj]

<http://www.limba.com/sk/slovensko/ponuka> [diversaj lingvoj]

<http://www.prenocuj.sk/> [sk, cs, en, de, pl, hu, es]

Turistaj informcentroj

<http://www.slovakiatravels.com/sections/comunity/linkRegional-sk> [sk, en, it, fr]

La slovakaj lingvoj

<http://slovakie.eu> — paĝaro por lerni la slovakon; ĝi enhavas ankaŭ minikurson kun utilaj frazoj por turistoj! [sk, en, de, pl, lt, fr, eo, es, cs]

Se vi tamen bezonus iun aldonan informon aŭ konsilon, bonvolu skribi pri tio al: ses@ikso.net

Programo

9. Instruado:

Instruado okazos en pluraj grupoj laŭ la lingvonivelo, ĉiam antaŭtagmeze (9.00-13.00). Dum la alvena tago, vendrede posttagmeze inter 17.00-19.00 okazos **mallonga testado**, por ke la instruistoj povu disdividi vin en grupojn laŭ viaj lingvo-scioj. **Ni forte rekomendas al ĉiuj ĉeesti ĝin!**

Tutaj komencantoj, kiuj absolute ne scipovas la lingvon, povos veni en la tempo de testado al la klasĉambro por komencantoj – kie ili havos enkondukan lecionon kun sia instruisto. (detalojn demandu dum la registriĝo aŭ serĉu post via alveno en la program-tabulo)

10. Distra programo:

En aparta dokumento ni sendos provizoran program-tabelon de SES. Ĝi ne estas kompleta; pluraj aferoj aldoniĝos al la programo dum la sekvaj tagoj kaj eĉ dum la aranĝo mem. Same povas eventuale ŝanĝiĝi tempoj de unuopaj prelegoj kaj prezentoj.

Dum la ekskursaj tagoj estos preparita aparta programo por tiuj, kiuj ne ekskursos – prelegoj, manlaboroj, sportoj k.a. (informoj pri tio aperos iom pli poste). Aldone eblas pasigi liberan tempon ekster la oficiala programo organizata de la SES-teamo (ekz. naĝante en naĝejo, ludante, promenante tra arbaroj, urbo k.s.).

***Rimarko:* ĉiam kontrolu programtabulon en la SES-ejo (kiu estos ĉe akceptejo, ĉe ĉefa enirejo) por ricevi la plej ĝustan kaj detalan informon pri la programo.** Aktuala programo ankaŭ aperos en Guglo-kalendaro – antaŭ la aranĝo ni informos vin pri ĝi. Ĉiuj aliaj fontoj de la programo (ekzemple tiu ĉi bulteno) povas enhavi malnovan kaj ne plu aktualan programon.

11. Via kontribuo:

Vi mem povas ankaŭ kontribui al la programo de SES: proponi ion interesan, kion vi dezirus prezenti al aliaj partoprenantoj (kantadon, prelegon, instruadon de via lingvo...). Se vi bezonas iun specifan ekipon por via programero, kontaktu organizantojn anticipe.

Via kontribuo estos ankaŭ bonvena dum la Internacia Vespero, dum kiu vi povos prezenti vian landon, kulturon, lingvon per ia artaĵo (kanto, spektaklo, muziko...). Prepariĝu volonte por ĝi jam antaŭ la aranĝo, kunportante ekz. muzikon aŭ muzikilon, tradician vestaĵon de via lando aŭ regiono k.s.

12. Aldona /libera/ programo:

Krom la oficialaj programeroj, vi havas liberan elekton por propra, privata pasigo de tempo. En la urbo Martin ekzistas pluraj atrakcioj kaj memstaraj festoj, pri kiuj eblas ekscii en urba turisma centro. En proksimeco estas i.a:

- la publika naĝejo „Sunny“ en Nitra (tuj apud SES-ejo)
- slovakaj naciaj biblioteko kaj muzeo
- promenoj tra la parko, vizito de muzeoj, galerioj, preĝejoj
- saŭno, sportumado...
- belega naturo de la ĉirkaŭaj montaroj

13. Ekskursoj:

Dum SES okazos 3 duon-tagaj kaj 2 tut-tagaj ekskursoj (pliaj detaloj: <http://ses.ikso.net/Ekskursoj>).

Duontagaj ekskursoj

- *Subĉiela muzeo kaj la urbo Martin*

(prezo: 7 EUR, dato: 2013-07-13)

La ekskurso celos konatigi vin kun la urbo Martin (kie SES okazos) kaj kun la historio de Slovakio.

- *Oravia burgo kaj oravia arbora trajnvojaĝo (per historia vaportrajno)*

(prezo: 18 EUR, dato: 2013-07-14)

- *Burgo Strečno, kastelo Budatín, urbo Žilina*

(prezo: 18 EUR, dato: 2013-07-18)

Tuttagaj ekskursoj, mardo, la 16-an de julio (ambaŭ okazos samtempe, eblas do elekti nur unu el ili):

- *Altaj Tatroj*

(prezo: 27 EUR, dato: 2013-07-16)

- *Bojnice - urbo, kastelo, bestoĝardeno...*

(prezo: 27 EUR, dato: 2013-07-16)

Kaze ke vi ankoraŭ ne mendis la ekskursojn, aŭ volas ŝanĝi vian elekton, faru tion laŭeble rapide (plej bone ĝis la 1-a de julio), ĉar la lokoj estas limigitaj. Vi povas mendi ilin aŭ informi pri ŝanĝoj sendante retmesaĝon al: katka.noskova@ikso.net

14. Anĝeloj:

Dum la aranĝo tiel nomataj **anĝeloj** zorgos pri „novuloj“ = tiuj, kiuj ne ĉeestis ĝis nun internacian Esperanto-aranĝon. Anĝeloj havos alikoloran (flavan) nomŝildon kaj prezentiĝos dum la unua vespero.

Homoj-anĝeloj povas helpi al tiuj, kiuj estas novuloj pli bone orientiĝi dum SES: konsili al ili programerojn, klarigi aferojn, preparoli problemojn... Anĝeloj estas kutime spertaj esperantistoj, kiuj bone konas similajn aranĝojn. Ne hezitu alparoli anĝelon, se vi ekhavos iun ajn demandon aŭ malfacilaĵon, ĉar ili volonte pretas helpi al vi!

15. Kontaktoj:

Se vi havas ajnajn demandojn aŭ komentojn, bv. skribi al ses@ikso.net

Ĝenerale ni petas kontakti nin rete, sed kaze de tre urĝa bezono dum via vojaĝo, vi ankaŭ povas kontakti organizantojn telefone:

Petro +421 902203369

Katka +421 948444380

Ĝis revido dum SES 2013 en Martin,
Via SES-teamo

